



Natalia Stalboun, rusa esperantistino de 1970 jaro. Laboras en la alternativa medicino de 1987. Loĝas kaj laboras en Meksiko, profesie praktikas akupunkturon kiel funkcia terapion.

MEDICINO SEN MEDIKAMENTOJ

Akupunkturo estas la formo de kuraci la organismon kaj preventi malsanojn sen medikamentoj. La filosofio kaj la praktiko de akupunkturo originas de la antikva Ĉinio.

La akupunkturo konsistas en apliko de ŝtalaj, oraj aŭ arĝentaj (en la antikveco ŝtonaj) nadloj en certaj punktoj del korpo. La punktoj troviĝas en la trajektorioj nombritaj kanaloj, aŭ meridianoj, iufoje fore de tiuj. La agaco de la punktoj povas esti realizata per la cigaro de artemizio. Ĉi tekniko nomiĝas moksado.

La nuntempa akupunkturo havas en sia dispono pli da instrumentoj, kiel aparatoj de lasero, elektroaparatoj, kiuj pasas la elektroimpulson helpe de elektrodoj al la nadlo enigita en la korpo por stimuli aŭ trankviligi la kanalon. Ekzistas formoj de laboro kun magnetoj, elektromagnetoj, mikronadloj, grajnetoj de mustardo kaj rizo, kun martelo de sep punktoj “floro de pruno”, mikromagnetoj kaj globetoj de diversaj metaloj.

La teknikoj estas multenombraj, sed la celo kaj la principo restas la samaj: reagi al la misfunkcio kaj reveni rezulte kun la normala metabolo. Eble iu povas pensi ke kun helpo de nadlo ni ne povas ŝanĝi la metabolon, sed nia praktiko atestas inverson, kaj ĉi tie ĉio dependas de la operatoro, kiu estas la akupunkturisto. Kompreneble kiam la korpo estas organike detruita, estas malmulte espereble aŭ neeble reveni kun la deira formo kaj rekonstrui “kiel estis”, kaj bedaŭrinde iuokaze ne estas eble redoni la sanon kaj la vivon al paciento, kaj tio estas la realo ajna medicino, la realo de la vivo. Sed aplikante la metodojn de akupunkturo ni povas forigi aŭ kontroli multajn patologiajn procesojn. Estas kontroleblaj kaj multfoje kuraceblaj tiaj malsanoj kiel astmo, diabeto, hipertensio, multaj digestaj problemoj, inklude toksadoj, multaj femalaj kaj masklaj malordoj, malordoj hormonaj, la doloroj de hemikranio, ostoporozo, gruzmalsano, multaj tipoj de inflamoj, komencante de la muskolaj kaj finante de gastraj, intestaj kaj hepataj. Akupunkturo povas esti utila kaj tre efika en postoperaciaj doloroj kaj edemoj. La specialistoj diras, la nadlo estas nobla. Ĝenerale la akupunkturo ne limigas sin kun la nadlo. Estas tre grave esplori bone la kutimojn, la karakteron, ĝis la formo de pensado de la paciento, lian fizikan aspekton, lian manieron de realizi la komunikiĝon, lian konduton. Ni povas stimuli la pacienton kun anemio, sed sen helpi lin ellerni kiel li devas sin nutri poste, ni ne povos kuraci lin de la malsano. Ĉio iras kune: la kutimo kiu direktas la vivon kaj la procesojn de la metabolo kaj la nadlo direktata per la akupunkturisto. Gravas kion manĝas la paciento, kiu hore, kiam kaj kiom dormas, kiel sin demonstras liaj emocioj, kiuj estas liaj ŝatataj gustoj. Parolante pri la gustoj, ni ne parolas pri la magio. Nia nutrado povas esti kuraca kaj povas esti malutila. Ĉiu organo havas sian guston, sian odoron, sian sonon. Tio ĉi estas grava por la diagnostiko kaj direkto de la proceso. La dolĉa gusto stimulas la lienon, la sala gusto stimulas la renojn. Ĉiu organo havas sian preferan guston, kaj estas interese ke la saman informon de la gustoj ofertas Ayurvedo, la antikva saniga sistema de Hindio,

kiu instruas kiel vivi en harmonio kaj sano uzante la nutradon kaj la mankantajn substancojn. Ankaŭ ĉi tiuj faktoroj importas al akupunkturo, sed la lasta iras pli profunde kaj laboras kun plia rapideco. Kompreneble, se ni subtenas la ekvilibron, ne importas tiom la rapideco. Tiel, akupunkturo estas la ariero de la orientala filozofio, kaj estas strikte en la kontakto kun la mateniĝoj kaj sunsubiroj, kun la sezonoj, la fazoj de la luno, kun la universala ritmo kaj ŝajnas esti la spiro de unu sola giganta estaĵo. Kaj la homo sole estas unu eta formacio de la grandioza partituro kaj devas vivi konsente kaj akorde kun sia rolo kaj sia loko, kun la ritmo, kiu estas unu sola por ĉio kaj por ĉiuj. Kaj se li transpaŝas la limon, aperas unue perturbo, kaj poste malsano. Bedaŭrinde, multaj limoj estas rompitaĵoj, la normoj faŭlitaĵoj danke a la “progreso” kiu gvidas la homaron al la konsumado kaj fiuzo de la artefaritaj substancoj, al la ŝanĝoj kiuj neeviteble sin manifestas en la persono vivanta la modernan vivon kun la ritmoj perturbadaj kaj sen scii kiel estri la procesojn. Tiel la akupunkturo okupas sian lokon tre specialan en la vivo, nin helpas rektigi kaj kompreni, eviti, preventi, ĝustigi kaj sekvi la vojon, sed kun la pensoproceso kaj sia manifesto iom malsamaj. Sed, lasante flanke la romantikon, ni povas subrigardi iomete en la “kuirejon” de la filozofio de akupunkturo. Kio okazas tie, kiel estas la proceso, sed ni devas esti tre diskretaj kaj respektaj, ĉar ĉio ĉi estas mistero.


La principoj kiuj nin permesas obteni la rezultojn iufoje mirindajn estas la Yin kaj la Yang, la bazaj principoj de la orienta filozofio. Nokto kaj tago, ripozo kaj aktiveco, frido kaj varmo, senbrilo kaj brilo, ombro kaj lumo... Plu, ni devas atenti ke ĉiam en yin estas yang, kaj en yang estas yin. La divido de la fenomenoj yin kaj yang povas esti senfina. En la homa korpo tio sin traktas kiel eksceso aŭ karencio, varmo aŭ frido. Ekzemple, yin, la malakra doloro (povas esti agresema); yang, la doloro akra. Kaj tiel manifestiĝas ĉiuj signoj kaj simptomoj. Ili disfaldiĝas kiel ventumiloj, kreskas unu de alia, kaj la akupunkturisto devas kapti la ludon de signaloj kiel akrobato kiu portas en siaj ŝuldoj tri personojn, unukrure direktas sian monociklon, aliakrure turnas ringegon, la manoj ludas torĉojn... kaj nenio falas. Sed tio ĉi jam estas la nivelo tre alta kaj multa sperto. Ĉiu kanalo ankaŭ reprezentas yin aŭ yang. Unu portas pli yin, kaj sin nomas la grande yin. Tiu kun la malpli yin sin nomas la malgranda yin, kaj la kanalo kun eta superregado de yin sin nomas “la fino de yin”. Dume la principo yin falas, la principo yang kreskas. Pro tio, oni diras, la yin kaj la yang sin generas kaj sin kontrolas reciproke. Kaj devas esti en

ekvilibro, en la profunda akordo, en la paco. Kiam ili ribelas unu kontraŭ alia, la organismo falas en malsanon. La tasko de la akupunturisto estas trovi la kampon kie la principoj perdis la akordon, kaj “repacigi” ilin. Se ni atingas tion, la malsano cedas kaj la paciento saniĝas.

太極

Fig. 1. La simbolo de

La simbolo de yin kaj yang populara, sed oni ne signifon de tiu. La Granda Ekstremo kaj figuro 1. Ĝi ne



La Granda Ekstremo.

yang estas tre konas multe la veran simbolo sin nomas La estas montrita en la

havas rilaton al “bono”


kaj “malbono”, ĉar la

principoj yin kaj yang havas nenion komunan kun la menciitaj kategorioj. Ili estas du principoj dignaj, egalaj en sia valoro, ne ekzistas unu sen alia kaj malsaniĝas ambaŭ kiam unu ne estas en ekvilibro. Tiu ĉi simbolo rilatas al ĉiuj universalaj fenomenoj por esti la fondo, la komenco de la ekzistado ĝenerale, la ekzistado de ĉiu objekto kaj ĉiu fenomeno, inklude la fenomenon de la homa ekzisto, kiel unu de multaj. En ĉi principo sin bazas la doktrino de la kvin elementoj. La kompreno de la teorio de la kvin elementoj malkovras multajn sekretojn, simplajn kaj komplikajn samtempe. Tio estas la komenco de la rego

del mistero kiun la antikvuloj nomadis “la internaj vojoj”. La kvin elementoj de la filozofio ĉina estas fajro, tero, metalo, akvo kaj ligno (fig.2).

Fig. 2. La rilatoj de intergenero (1), interdomino (2), eksceso de domino kaj inversdomino (3) inter la kvin elementoj: Ligno, Fajro, Tero, Metallo kaj Akvo.

Tiuj ĉi estas nomoj, la oportunaj vortoj por indiki kaj regi la fenomenojn. Ĉiu elemento havas sian lokon kaj estas la fonto de la deveno de la certa organo kun la spektro de ĝiaj funkcioj kaj respondecoj. Ĉiu organo kaj ĉiu visceroj havas sian deĵoron, diri pli klare, du



horojn de la dudekkvar. Dum la deĵoro eblas enigi la remedojn de kuraco aŭ profiti de la aktiva kanalo aliaforme. Por tio ekzistas ĝiaj reguloj, kaj uzi tiujn signifas amplifi la efikecon de kuracado. Rezultas grave mencii la horojn por certaj aktivecoj. La ciklo de 24 horoj komenciĝas kun la laboro de la pulmoj, de 3-a ĝis 5-a horo de mateno. Multaj kuracistoj (kaj la pacientoj kun astmo, certe!) konfirmos ke ĉi tiuj horoj estas krizaj por la bronko- kaj pulmomalsanuloj. Okazas atakoj de astmo, la krizoj de pulmo- kaj bronkoinflamoj, reaperas tuso. La ciklaj transformoj de la homa organismo komenciĝas de la inicialpunkto en 3-a horo de la mateno, kiam sin kluĉas la yin-meridiano de la

pulmoj. Tio ĉi sin klarigas pli kun la fakto ke en naskiĝo de homo la unua enspiro kaj la unua krio, kiuj estas la pulmaj manifestiĝoj, ĉiu organizmo komencas ekzisti kaj funkcii memstare kaj ĉene. De 5 ĝis 7 estas la horoj de la dikintesto, de 7 ĝis 9 de la stomako. Kaj la lastaj menciitaj horoj estas gravaj por nutri la organismon. Se ni ne faras tion, la organismo en la horo del deĵoro de la lieno restas sen “brulmaterialo” kaj ne povas generi sangon. La homo povas disvolvi debilecojn, inklude anemion. Tio gravas por ĉiuj, kaj speciale por tiuj suferantoj de astmo, anemio kaj ĝeneralaj debilecoj. La medicino ĉina diras ke estas du tipoj de malsanoj, la unua kaŭzata de karencio kaj la dua, kaŭzata de eksceso. Inklude tion ke sin rigardas kiel la malsano okcidenttradicie devas esti rerigardita de vidpunkto de la ekvilibro inter yin kaj yang por povi apliki adekvatan terapion kaj atingi resaniĝon. Kaj tio ankoraŭ ne estas la kompleta ĉeno, ni nur levetis iom la kurtenon kaj subrigardis.

La bazaj meridianoj estas 12, ili komunikas kun la 5 organoj, 5 visceroj kaj 2 funkciaj cirkloj, kiuj estras la sistemojn seksan kaj vaskulan (pericardio, yin) kaj la procesojn de la tri partoj de la corpo (la triobla hejtilo, yang). Per la punktoj de la meridianoj ni povas influi la procesojn de la histoj kaj organoj, uzante la kanonojn de la ĉina medicino, kiel “patrino-filo”, “avo-nepo”, “mastro-gasto”. La regulo “patrino-filo” nin montras ke la malsano de la “filo” debiligas la “patrinon”. Tio signifas ke ni ne povas efiki nure la organon kiu aperas kaj ŝajnas malsana, ekzemple en la menciita kazo de astmo ni devas efiki ne sole la pulmojn, sed ankaŭ la lienon, kiu nin helpas solvi la problemon. Sekvante la regulon (kaj la leĝon!) de la kvin elementoj ni devas efiki la organo-“patrinon”, en la kazo de la pulmoj tiu estas la lieno, la “patrino” de la pulmoj.

Ĉiu meridiano havas siajn proprajn bazajn parametrojn (fig.3):

1. La direkton.
2. La amplitudon (la gradon de la frekvenco).
3. Lokalizon relative la aliĝintaj vojoj (La komenco kaj la fino de aliaj meridianoj, iliaj interkomunikaj vojoj).

En la tempa aspekto la cikloj dividiĝas en tiuj de la tagnokto kaj de la jaro (la sezono). Ĝenerale la homa vivo estas cikla, kaj la celo de akupunkturo estas sinkronigi la horloĝojn de la diversaj niveloj, ĉar malfrui aŭ hasti por la menciionataj cikloj signifas esti en malsano.




Fig. 3. La
(meridiano)
kun la

kanalo
de la pulmoj
topografio de

la punktoj kaj la internaj vojoj. La directon de la kanalo montras la sagetoj. La interkomunikajn kaj internajn vojojn montras la strekoj. La punktoj de la kanalo P1 – P11.

Multaj personoj pensas ke ekzistas “la punkto por doloro de kapo” aŭ “la punkto por gastrito”, “punkto por la hipertensio”. Estus tro facile, senresponse kaj absolute naive kuraci la organismon tiamanere. Tio okazanta en la kapo devenas de la organoj, de tio okazanta interne. Por atingi rezultojn, ni devas imagi la reton de la problemoj kun ilia deveno kaj origino, samtempe forigi la ekscesojn kaj stimuli la debilecojn. Ni povas renkonti altan arterian tonion, stomakajn problemojn, takikardion, triglicerinojn en eksceso kaj astmo en la sama persono kaj en la sama momento kaj ni devas solvi ĉiun el la “ensemblo” samtempe, ĉar ne estas alia varianto. La paciento devas senti senprokrastan remiton, kaj tio ŝajnas tre simpla kaj naturala, ne multaj personoj komprenas kiom fenomeno estas la kuraco kun “la nadlitoj” kaj kial en unu kazo funkcias senrifuze kaj rapide, kaj en aliaj ne donas iun rimarkeblan efekton. Kuras la unio de la racio, volo, sperteco, la mano kaj la nadlo kiel unusola pinto kiu portas la intencon, la ideon kaj la volon de la operatoro kaj danke al ĉi faktoroj li sinkronizas la rompitan bioritmon. Oni diras en Hindio: la mano estas kiel vorto, la vorto kiel penso, la penso kiel fulmo. Ĉio ĉi devas esti kaj ĉeesti en la operatoro, en la akupunkturisto. Neniu scienco funkcias en la manoj neadekvataj.

Parolante de la metodoj, ni menciis la kanalojn, aŭ la meridianojn, kiel la parton “videblan”, kiun oni povas memori kaj ellerni, kiel oni povas ellerni la geografion kaj anatomion. Oni devas scii ilin, sed sole tio ne estas la stango por movi “ne videblan”: la perversiojn, la perturbitajn ritmojn, kaj repara la funkciojn. La punktoj sin dividas en sia graveco. Ekzistas punktoj de plia graveco, sed tio ne signifas ke ili povas kuraci ĉiujn malsanojn sole pro tuŝi aŭ premi ilin. La “simpla” kapdoloro povas havi tiom da kaŭzoj ke la tuta organismo devas esti kuracata, ne sole “la punkto por kapdoloro, memorado facile”. Ĉar kiam ne funkcias, oni rapidas juĝi ke “ne funkcias” la akupunkturo aŭ “estas tre malforta kaj ne multe helpas en la kazoj malfacilaj”. Akupunkturo estas la disciplino-esploristo, rafineca, profunda kaj atenta. Kaj multfoje ni forigas kapdoloron ke neniam estis en la kapo. Unue la kaŭzo, poste la kuracado, kaj sole post tio la efekto. La efekto

sin manifestas en unu sola seanco, iukaze en tri. La kompleta kurso estas de 10 ĝis 20 seancoj. La tradicioj estas diversaj, la kolegoj ĉinaj rekomendas de 15 ĝis 20, la kolegaj rusoj – 10. Ili komentas ke en 7 seancoj sin atingas la maksimuma efekto kaj en 3 sekvontaj sin fiksas. Plu la organismo devas sorbi la informon kaj ripozi. Se ne manifestiĝas pliboniĝo en la tri seancoj, ni devas pensi en iu eraro en la terapio. La malsanoj sin manifestas diversforme, estas kazoj kiuj ŝajnas tre malfacilaj, sed kun iom da atento solviĝas. Estas kazoj, kiam ni povas kontroli la situacion, kaj estas kazoj kiam bedaŭrinde ni ne povas fari multon. Sed tio estas por la specialistoj, kaj ĉiam ni devas apliki la manojn kaj nin streĉi kune kun la paciento. Oni diras ke kuracas la Naturo, kaj nia sano estas kiel supro de la monto, kaj ĉiu homo konkeras tiun memstare.